Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Nikolaj Ivanoviĉ Vavilov (1887–1943)

Elstara rusa kaj soveta genetikisto naskiĝis en vilaĝo Ivaškovo, li devenis el agrokulturista familio kaj estis bonega studento. Pro tio li studis ne nur en Ruslando, sed ankaŭ en Grandbritio, Francio kaj Germanio. Li sciis rezultojn de laboroj de elstaraj selektistoj Luther Burbank kaj Ivan Vladimirovič Miĉurin. Dum multaj ekspedicioj li kolektis plantojn, kiuj povis esti taŭgaj por krucigado kaj kreado de novaj sortoj. En Kartvelio li signife pligrandigis rikoltojn de subtropikaj plantoj. Plej ofte li okupiĝis pri cerealoj, ĉar en lia patrujo minacis malsategoj. Laŭ lia leĝo pri homologaj lineoj de hereda varieco oni povas antaŭvidi proprecojn de plantoj, kiuj ekestos pere de venontaj mutacioj. Progresemaj sciencistoj Vavilovon estimis. En la jaro 1936 li honore doktoriĝis en Agrokultura Altlernejo en Brno, kvankam kaŭze de malsano li ne povis persone partopreni en la ceremonio. La plej granda scienca kontribuo de Vavilov estis trovoj de originaj genaj centroj de kulturaj plantoj. Laŭ ekzemplo de Vavilov botanikistoj fondis kolektojn de plantaj specioj kaj sortoj. En tuta mondo botanikaj ĝardenoj kaj botanikaj institutoj konzervas originajn speciojn kaj povas doni taŭgan komencan materialon por krucigado. Prelego pri Vavilov estos dediĉita ankaŭ al konciza resumo de historio de genetiko.

Kiam: la **11**-an de novembro 2026 je **18.00** (UTC+1), la klubejo esto malfermita ekde 17.45.

Prelegos: Oldřich Arnošt Fischer

Lingvo: Esperanto

Kie: Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi estos registrata.



Ni rekomendas

- La 26-a ĝis 29-a de novembro 2026 7-a Virtuala Kongreso de Esperanto
- La 12an de decembro 2026 Zamenhofa Tago en Vieno
- La 15 de decembro 2026 Edukado.net estas 25-jara
- La 14an — 17an de majo 2027 La Eŭropa Kongreso de Esperanto, Carry-le-Rouet, proksime de Marsejlo en Provenco.
- La 16an —23an de julio 2027 La 60-a ILEI kongreso. Jenia Góra, Pollando
- 3-a — 10-a de julio 2027 112-a Universala Kongreso de Esperanto, Melbourne, Aŭstralio
- La 15an — 22an de aŭgusto 2027 Internacia Junulara Kongreso, Petzow, Germanujo
- La 21an — 28an de aŭgusto 2027 93-a Itala Kongreso de Esperanto, Crema, Italujo

Ĉu vi organizas interesan aranĝon? Aŭ vi scias pri interesa, precipe internacia aranĝo? Skribu al ni. Eble venonte tie povus esti evento, kiun vi rekomendos.

Legu librojn en Esperanto kaj montru, ke indas ilin legi. Pruntu librojn en Moravia landa biblioteko en Brno. Antaŭ du jarojn ni transdonis al ili nian kluban bibliotekon.



Cetera programo en novembro

La 18an **Ni estas, kion ni manĝas** – Květa Krajíčková,*Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.*

La 25an **Fabeloj** – Miroslav Malovec. *Lingvaj ekzercoj*, klubejo



Programo en decembro

La 2an **Kion ni legas**. Rakontado pri libroj en Esperanto, kiujn vi legis precipe dum la dua duono de la jaro. *Rete per Jitsi.* Se vi ankoraŭ legis nenion, rapide ion tralegu. Ĉu vi havas nenion por legi? Loĝantoj en Ĉeĥio povas printepreni librojn en Esperanto en Moravia landa biblioteko en Brno (eblas ankaŭ per Interbibliotek pruntservo - ĉeĥe MVS - el iu ajn

bibiloteto) aŭ vi povas prunti librojn el Libroservo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio)

La 9an **Antaŭkristnaska renkontiĝo** – Milan Kolka, klubejo

La 16an *Ankoraŭ neagordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom*

Ni jam komenciĝis prepari programon por la unua kvarono de la vononta jaro. Programo por januaro estas jam agordita, sed ankoraŭ ni havas nenion por februaro kaj marto. Se vi havas interesan temon, kiun vi volas prezenti, ne hezitu skribu al ni. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon.

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailerlite